**Monda Turismo**

**Międzynarodowe Studium Turystyki i Kultury**

**Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo**

**Przemysław Grzybowski**

# Materialoj pri Esperanto-kulturo
# LINGVO KAJ MOVADO

helpilo por studentoj
de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo
klerigejo de la
Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Bydgoszcz 1999

**Monda Turismo**

**Międzynarodowe Studium Turystyki i Kultury**

**Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo**

**Przemysław Grzybowski**

# Materialoj pri Esperanto-kulturo

# LINGVO KAJ MOVADO

helpilo por studentoj

de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo

klerigejo de la

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Bydgoszcz 1999

## Informoj de la eldonisto

* *Indikitaj en la informilo adresoj, rimarkoj rilatantaj nombrojn ktp. estas ŝanĝeblaj. Interesiĝintoj estas petataj konsulti respektivan „Jarlibron" de UEA kaj sekvi anoncojn aperantajn en „Esperanto" kaj aliaj revuoj.*
* *La esperantigitaj nomoj de urboj aperantaj en la ĉapitroj pri historio por la unua fojo, estas akompanataj de iliaj naciaj formoj - /en krampoj/.*
* *La nomoj de institucioj, servoj kaj organizaĵoj estas ordigitaj laŭ la alfabeta ordo, kaj ne laŭ ilia graveco.*

Dua eldono korektita kaj plenigita

Eldonis:

Monda Turismo

str. M. Skłodowskiej-Curie 10

85-094 Bydgoszcz

tel, (48-52) 3415-744, 3460-082

kaj

Poligrafia kaj Eldona Entrepreno *„Skonpres"*,

str. Chłodna 23a

85-345 Bydgoszcz

tel. (48-52) 32 37 099, 38 14 754

Teknika redaktanto: J. Skonieczka

Presita de: *„Skonpres"*,

ISBN 83-87145-06-8

# ANTAŬPAROLO

Fine de 1998 jaro MONDA TURISMO eldonis la unuan kajeron de Materialoj pri Esperanto-Kulturo „Lingvo kaj movado" skribitan de Przemysław Grzybowski kaj prilaboritan de Jan Skonieczka. Ĝi estis destinita al la gestudentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz - klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. La unua eldono en mil ekzempleroj elĉerpiĝis dum unu monato kaj neatendite venis mendoj el Hispanio, Usono kaj Kanado, kio devigis nin prepari la duan eldonon de la sama kajero, kun kelkaj korektoj. Ĝin ricevos ĉefe partoprenantoj de la 9 Eŭropa Esperanto-Forumo kaj la 58 Hispana Esperanto- Kongreso en Castellon - Valencio kaj geesperantistoj en Hispanio, Usono kaj Kanado, ĉar dank' al ilia mendo la dua eldono povas aperi. Sube ni publikigas la adresojn de la kvar organizaĵoj - kuneldonantoj, ĉe kiuj ankaŭ Vi povos la kajeron aĉeti.

Esperante, ke ni povos daŭrigi nian laboron sur tiu-ĉi kampo ni estos kontentaj ricevi Viajn rimarkojn kaj sugestojn por prepari pliajn eldonaĵojn por la gestudentoj kaj komencantaj esperantistoj.

mag. Andrzej Grzębowski
Prezidanto de MONDA TURISMO

La adresoj de kuneldonantoj:

1. Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz
   str. M. Skłodowskiej - Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz,
   Pollando, tel. (48-52) 3415744, 3460082
2. Grupo Esperanto de Valencia
   Avenida Peris y Valero, 96, 5-a, ES-46006 Valencia,
   Hispanio, tel. (34-96) 3744399
   retadreso: esperanto@nexo.es
3. Esperanto-Ligo
   5712 Hollis St., Emeryville CA 94608, Usono
4. S-ro Normand Fleur
   6358 rue de Bordeaux, Montreal QCH 2G2R8, Kanado

# Enhavo

La ĉefaj datoj de la vivo de Lazaro Ludoviko Zamenhof ....................5

Evoluo de Esperanto kaj la Esperanto-movado ............................... 7

Kelkaj organizaĵoj kaj institucioj de la Esperanto-movado ....................14

La servoj unikaj en la Esperanto-movado ........................................... 16

Kelkaj kursejoj kaj kulturaj centroj de la Esperanto-movado ................17

La plej konataj Esperanto-bibliotekoj kaj muzeoj ................................ 18

Konsilata baza literaturo ....................................................................... 19

*Post la aperigo de la unua eldono de ĉi - broŝureto montriĝis, ke kelkaj personoj ligitaj kun diversaj organizoj kaj institucioj de Esperanto-movado, sentis sin surprizitaj kaj eĉ ofenditaj, ke la karaj al ili nomoj ne estas citataj en la eldonaĵo. Tio okazas ĉiam, kiam la materiaj kialoj ne permesas informi pri ĉio kaj ĉiuj, kaj la pritraktata kultura fenomeno estas tiom vasta, ke ne eblas fari distingajn klasifikojn. Ĉiam do mankos io. Krome, la celo de la aŭtoro kaj la eldonisto ne estis iu imitado de la ja neimitebla „Jarlibro" de UEA, sed simpla montro al junaj homoj de varieco ekzistanta en la movado, kiun ili ekkonas.*

## La ĉefaj datoj el la vivo de Lazaro Ludoviko Zamenhof

### *(kun kelkaj datoj de liatempa E-movado)*

**1859** - (15.12. aŭ 3.12. laŭ ortodoksa kalendaro) L.L.Zamenhof naskiĝis en Bialistoko /Białystok/ (Pollando - tiam anektita de Rusio, ĝis 1918), kiel filo de Marko kaj Rozalia Zamenhof (naskita Sofer).

**1873** - Translokiĝo de la Zamenhof-familio al Varsovio /Warszawa/, kie L.L. Zamenhof eniris la trian klason de la Varsovia Dua Filologia Gimnazio.

**1878** - (17.12.) Familia festo okaze de la naskiĝo de Lingwe Uniwersala - praaĵo de Esperanto konceptita de L.L.Zamehof en gimnazio.

**1879** - Forveturo al Moskvo /Moskva/; enskribiĝo en la Moskva Universitato por la unua kurso de la Medicina Fakultato; apero de la unuaj verkoj de L.L.Zamenhof (ruslingvaj poemoj kaj artikoloj) en moskvaj ĵurnaloj.

**1884** - Renkontiĝo kun Klara Zilbernik - estonta edzino de L.L.Zamenhof; hazarda konatiĝo kun aperinta antaŭ kvar jaroj Volapuko (la internacia lingvo kreita de Johann Martin Schleyer) kaj kritiko de ĝia koncepto.

**1885** - Ricevo de la medicina diplomo de la Imperiestra Varsovia Universitato; komenco de la kuracista praktiko en Vejsejoj /Veisiejai/ (Litovio) - ĝi fiaskis pro la tro granda impresiĝemo de L.L.Zamenhof antaŭ la suferoj de la malsanuloj; reveno al Varsovio.

**1886** - Post vizitado de speciala kurso pri oftalmologio en Vieno /Wien/ (Aŭstrio), reveturo al Varsovio; komenco de la okulista praktiko.

**1887** - (junio-julio) Finaranĝo de ĉiuj necesaj permesoj por la aperigo de la Unua Libro de D-ro Esperanto, kiu aperas en la rusa lingvo, eldonita de Ch.Kelter; edziĝo de L.L.Zamenhof kun Klara Zilbernik. - (septembro-novembro) Ricevo de la cenzuraj permesoj por la aperigo de la Unua Libro en franca kaj germana lingvoj.

**1888** - Ricevo de la cenzuraj permesoj por la aperigo de la Unua Libro en angla lingvo, la Dua Libro de l'Lingvo Internacia (permeso por la rusa traduko) kaj la Aldono al la Dua Libro de l'Lingvo Internacia; estas kreita la unua esperantista grupo (en Nurenbergo/Nürnberg/, Germanio), gvidata de Ch.Schmidt.

**1890** - Eldono de la unua „Adresaro” (ĝi entenis alfabete ordigitajn adresojn de mil esperantistoj el 266 urboj).

**1893** - Fondo de la Ligo de la Esperantistoj; publikigo de la „Universala Vortaro” (entenanta 2600 radikojn); kreo de la unua E-rondo sur teritorio de Pollando (en Varsovio).

**1905** - Vojaĝo de L.L.Zamenhof kun la edzino al Francio, kie li estas nomumita kavaliro de la Honora Legio kaj renkontiĝas kun Louis de Beaufront - eldonisto, la fondinto de la Franca Societo por la Propagado de Esperanto; solena malfermo de la unua Universala Kongreso (5.08.); akcepto de la Bulonja Deklaracio. Komenciĝas la periodo de multaj vojaĝoj de L.L.Zamenhof ligitaj kun E-movado.

**1906** - Apero de la unua numero de la revuo „Pola Esperantisto” - eldonas ĝin Esperanto-Asocio en Lvovo /Lwów/.

**1908** - Fondo de Universala Esperanto-Asocio; oficialigo de Pola Esperanto-Societo.

**1912** - Universala Kongreso en Krakovo /Kraków/ (Pollando), kie L.L.Zamenhof faras sian lastan kongresparoladon; aperigo de „Lingvaj respondoj”.

**1916** - L.L.Zamenhof akceptas la viziton de Edmond Privat.

**1917** - (14.04.) L.L.Zamehof mortas pro kormalsano kaj du tagojn poste estas entombigita en la hebrea tombejo de Varsovio (ĉe la strato Okopowa).

**1926** - (18.04.) Solena inaŭguro de granita monumento sur la tombo de L.L.Zamenhof en la varsovia tombejo, en la ĉeesto de reprezentantoj de la pola registaro.

## Evoluo de Esperanto kaj la Esperanto-movado

Statistike en E-vortaro troviĝas ĉirkaŭ 60% de latinidaj radikoj, 30% germanaj kaj 10% slavaj. La esperantologiaj esploroj, el la proponitaj de L.L.Zamenhof en la „Fundamento de Esperanto" 2629 bazaj vortoj, fremdaj al franco estas nur 13% (343 vortoj), al anglo 30% (780), al germano 32% (842) kaj al ruso 60% (1512). Tiu lasta konkludo pli malpli rilatas ankaŭ polojn kaj aliajn slavojn. Pluraj novaj vortoj poste adaptitaj kaj akceptitaj de la Akademio de Esperanto, ŝanĝis tiun rilaton profite al pli granda internacieco de la E-vortaro, kio signifas, ke la lingvo evoluas laŭ la moderna maniero, konforma al la celoj de ĝia kreinto.

En la historio de Esperanto oni povas indiki jenajn periodojn:

**I-a (1887-1905)** - ekde la kreo de la lingvo ĝis la Unua Kongreso: evoluo de la lingvo en precipe skriba formo, ĉefe en Rusio kaj Pollando.

**II-a (1905-1914)** - ekde la Unua Kongreso ĝis la unua mondmilito: evoluo de la parola formo kaj kreado de la literaturo.

**III-a (1914-1919)** - stagnado pro la milita kaoso.

**IV-a (1920-1939)** - vasta disvolviĝo de la E-movado kaj interlingvistiko en la spirito de pacifismo kaj neŭtraleco; disvolviĝo de la scienc--teknika E-terminaro.

**V-a (1939-1945)** - stagnado pro la milita kaoso.

**VI-a (de 1945 ĝis nun)** -multflanka evoluo de la E-movado en la tuta mondo, perfektigado de la lingvo, simpligado de skribo, pliriĉigado de vortaro.

L.L.Zamenhof volis, ke la lingvo, kiun li kreis fariĝu propraĵo ne nur de minoritatoj, sed ankaŭ de la plimulto. Li opiniis necesa lingvon, kiu de unu flanko ne estus ekskluzive propraĵo de iu aparta nacio kaj de la dua flanko povus esti libere uzata de popoloj senlingvaj kaj subpremataj. Tio signifas, ke lia koncepto de la internacia lingvo tuŝis ne nur neŭtralecon, sed ankaŭ planon de evoluiga moralo. Temis pri kreo de iu subtila ponto, per kiu diversigitaj laŭ rasoj, religioj, naciecoj kaj ekonomipolitikaj sistemoj homoj povus unuiĝi en frata kunvivado.

En marto 1906 L.L.Zamenhof aperigis la broŝuron „Homaranismo", en kiu li detale priskribis sian teorion de la ideo, laŭ kiu ĉiuj popoloj kaj religioj, ne rezignante pri siaj specifaj trajtoj, renkontiĝu sur neŭtrale-homa fundamento, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. Ĝi tamen ne plaĉis al tutmonda esperantistaro, ĉar gvidis al danĝero, ke la E-movado povus akiri trajtojn de iu religia (kvankam teorie neŭtrala) mistikismo. Tiun penson L.L.Zamenhof anstataŭis per koncepto de la „interna ideo" postulante, ke esperantistoj uzadu la lingvon ne nur surbaze de la penso pri ĝia praktika utileco, sed la penso pri frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Kompreneble en tiom malvasta publikaĵo ne eblas eĉ supraĵe skizi la historion de la E-movado, ni do prezentas ĉi-sube nur kelkajn pli gravajn faktojn kaj dokumentojn.

En la Unua Libro L.L.Zamenhof aperigis kuponetojn kun teksto de promeso, ke la leganto eklernos Esperanton, se dek aliaj milionoj promesos la samon. Tamen pli multaj interesiĝintoj ne faris la promeson, sed tuj eklernis kaj ekuzis la lingvon. Sekve de tio L.L.Zamenhof ricevadis amason da leteroj kun multaj aproboj kaj amikaj kritikoj, proponoj aŭ konsiloj por plibonigo de la lingvo. Kompreneble estis tre malfacile rekoni ĉiujn el ili, precipe ke ili ofte kontraŭstaris unu la alian. Kiam aperis la Dua Libro, L.L.Zamenhof deklaris, ke li ne volas esti la kreinto de la lingvo, sed ĝia iniciatoro, kaj la afero de ĝia evoluiga plibonigo kuŝas jam en la vivo - en la manoj de ĉiuj uzantoj, kiujn povus reprezenti ekzemple iuspeca senpartia lingva akademio. Tiucele devis aperi iuj pli firmaj strukturoj, organizaĵoj, kies membroj povus libere interŝanĝi ideojn kaj antaŭenpuŝi la aferon. En la jaro 1888, en Nurenbergo naskiĝis la unua esperantista grupo. Ĝi estis iama klubo de volapukistoj, kies la plej fervora membro L.Einstein ricevis ambaŭ librojn de L.L.Zamenhof kaj tuj konvertiĝis pri la supereco de Esperanto super Volapuko, instigante al la studado siajn kolegojn.

Unu jaron poste aperis la monata gazeto „Esperantisto", kiu ĉe la fino de la unua jaro de sia ekzistado havis 113 abonantojn kaj rapide iĝis tre efika ligilo inter diverslandaj esperantistoj. Ĝiaj plej multaj abonantoj estis el Rusio, la teritorio de Pollando (i.a. A.Grabowski) kaj Francio (i.a. L. de Beaufront). Tiun tempon markis multaj financaj malfacilaĵoj, kiujn solvadis la helpo de L.L.Zamenhof kaj aliaj, ne ĉiam riĉaj esperantistoj. Naskiĝis novaj grupoj en Germanio, Svedio, Hispanio kaj multaj rusaj urboj. L.L.Zamenhof publikigis en „Esperantisto" gramatikon kaj vortaron de la „nova" lingvo, konstruita laŭ la proponitaj ŝanĝoj. Post dufoja voĉdonado de la abonantoj oni dicidis lasi senŝanĝe la malnovan formon de la lingvo. Oni decidis, ke Esperanto estos kulturata danke al verkado, kaj ĝia uzado parola kaj skriba.

En 1895 okazis la unua politika skandalo ligita kun Esperanto. Kaŭzis ĝin aperigo en „Esperantisto" de artikolo de la granda rusa verkisto L.Tolstoj, kiu mem fariĝis fervora apoganto de la internacia lingvo. La teksto ne plaĉis al imperiestraj cenzuristoj kaj ili malpermesis daŭran eldonadon de la revuo.

Kelkajn monatojn poste en sveda urbo Upsalo /Uppsala/, la loka E-grupo komencis eldonadon de nova gazeto - „Lingvo Internacia". Ĝi estis iniciatita de universitatano V.Langlet - unu el la unuaj, kiuj entreprenis eksterlandajn vojaĝojn per Esperanto. La gazeto aperadis en Svedio kaj poste en Hungario kaj Francio, ĝis la eksplodo de la unua mondmilito. En la lastaj sep jaroj de sia ekzistado, la gazeto estis tre konservativa, batalis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo kaj toleris nur ĝian naturan evoluadon.

La unuaj internaciaj vojaĝoj de kelkaj rusaj kaj svedaj esperantistoj vekis grandegan intereson de esperantista kaj ekstermovada medioj. Ili pruvis, ke la lingvo bonege taŭgas por senpera parola komunikado kaj interkompreno. Instigitaj de tiu sensacia afero, francaj esperantistoj el Havro /Le Havre/ aranĝis en 1903 kunvenon, invitante kelkajn alilandajn esperantistojn. Unu jaron poste simila renkonto okazis inter anglaj kaj francaj esperantistoj en Kalezo /Calais/ (Francio) kaj Dovro /Dover/ (Britio). Ĝuste el tiuj sukcesintaj kunvenoj naskiĝis la ideo de internaciaj E-kongresoj.

La unuan iniciatis franca advokato el Bulonjo ĉe Maro /Boulogne sur Mer/ A. Michaux - ĝi okazis en aŭgusto de 1905. Partoprenis ĝin preskaŭ sepcent esperantistoj, entuziasmigitaj de la etoso. Dum la kongreso finfine malaperis timo kontraŭ la hipotezo, ke eble Esperanto ne estos sufiĉe komprenebla parole kaj eble ekzistos tro grandaj diferencoj en prononcado de diverslandanoj. Post multaj diskutoj kaj paroladoj oni okazigis eĉ teatran vesperon, dum kiu estis prezentita la komedio de Molière „La edziĝo kontraŭvola". Dum la unua kongreso sian definitivan formon ricevis ankaŭ la esperantista flago - la la projekto de A.Michaux verdkolora, angule kun blanka kvadrato kaj kvinpinta verda stelo. Por la E-movado la unua kongreso havis gravegan signifon. Oni decidis pri la fondo de Lingva Komitato kaj Organiza Komitato, kiuj konforme zorgis pri la evoluo de la lingvo kaj organizado de universalaj kongresoj. La plej grava tamen montriĝis tiel nomata Bulonja Deklaracio:

Deklaracio pri Esperanto

*Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la Internacia Kongreso Esperantista en Boulogne sur Mer, trovis necesa, laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto, doni sekvantan klarigon:*

*1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu „ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.*

*2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke Lingvo Internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj jarcentoj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj la lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de Lingvo Internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam delonge ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.*

*3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas „nenies propraĵo", nek en rilato materia, nek en rilato morala. Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj la plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.*

*4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan.*

*La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto", en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras kaj konsilas aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto", ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.*

*5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.*

La Bulonja Deklaracio montris la vojon de evoluo al Esperanto kaj la E-movado. Okaze de la 25-a datreveno de Esperanto, la universala kongreso okazis en Krakovo. Tie L.L.Zamenhof definitive rezignis pri sia oficiala rolo en la E-movado. Dum la unua mondmilito la E-movado spertis multajn problemojn. Tamen nepre substrekinda estas la agado en Svislando de H.Hodler - la kreinto de Universala Esperanto-Asocio, kiu ne nur gvidis agadon de la organizaĵo kaj redaktadis la revuon „Esperanto", sed ankaŭ aranĝis servon por helpi al homoj disigitaj de ilia familio. En militkaptitejoj, la Tutmonda Komitato de YMCA (Junulara Vira Kristana Asocio) disdonis milojn da E-lernolibretoj inter diverslingvaj militkaptitoj, kio donis al la E-movado tute novan karakteron.

La intermilita periodo pruvis al ekstermovadaj observantoj, ke Esperanto transvivis la provon de tempo. Malgraŭ la forpaso de multaj pioniroj de la movado, okazis pluraj sukcesaj kongresoj, kiuj havis gravan politikan signifon. La propagandado pri Esperanto ŝanĝis sian aspekton. Nun ĝi celis precipe la progreson de la utiligo de Esperanto, ĉefe rilate fakajn aferojn. En 1922 E.Privat iniciatis en Ĝenevo /Genève/ (Svislando) ĉe Ligo de Nacioj, la unuan fakan konferencon pri instruado de Esperanto. Sekvis ĝin preparita de UEA kaj Itala Komerca Ĉambro en Ĝenevo la Komerca kaj Turisma Konferenco en Venecio /Venezia/ (Italio) kaj multaj similaj aranĝoj. Samtempe komenciĝis la triumfa vojo de rektmetoda E-instruado, kies pioniro estis hungaro A.Cseh. Estis kreitaj Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Someraj Universitatoj. Esperanto aperadis sur diversaj komunikiloj: poŝtmarkoj, poŝtkartoj, glumarkoj kaj paneloj uzataj en trajnoj. En 1925 el Budapeŝto /Budapest/ (Hungario) estis disaŭdigita la unua programo en Esperanto en radio. Turismaj vojaĝoficejoj amase eldonadis prospektojn, afiŝojn kaj aliajn propagandilojn uzante la internacian lingvon. La periodon de 1934-46 en la E-movado markis ĝenerala nervozeco, ligita kun politikaj kaj militaj konfliktoj de la mondo. Komenciĝis la persekutado de esperantistoj fare de nazioj kaj komunistoj, mankis kontaktoj, revuoj, eldonaĵoj, kaj en multaj landoj la organizita esperantista agado tute kolapsis. Multaj esperantistoj fariĝis viktimoj en bataloj, koncentrejoj kaj ekzekutoj. Fortan krizon travivadis UEA kaj laboristaj E-organizaĵoj. Post la dua mondmilito komenciĝis periodo de repaciĝo kaj rekonstruado de la E-movado. Reviviĝis ĉefaj organizaĵoj kaj universalaj kongresoj, kaj E-kulturo pliriĉiĝis danke al firma funkciado de la Internacia Somera Universitato, belartaj kaj oratoraj

konkursoj. En la kvindekaj jaroj komenciĝis intensa agado de UEA kaj ĝia ĝenerala sekretario I. Lapenna por krei firmajn rilatojn kun UNESKO - la ĉefa oficiala kultura organizo de la mondo. Tiun agadon kronis en 1954 la fama rezolucio:

Rezolucio de UNESKO

IV.1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto;

IV.1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV.1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV.1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV.1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

*Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo, 1954.*

UNESKO aperigis siajn afiŝojn pri homaj rajtoj kun E-tekstoj, kaj en sia oficiala organo ofte publikigis favorajn artikolojn kaj sciigojn pri la E-movado. Esperanto ankoraŭfoje aperis en la dokumentaro de UNESKO en la rezolucio de 1985 pri festado de la centjariĝo de Esperanto:

La Ĝenerala Konferenco

**Konsiderante**, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj inter ŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonas, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,
**Memorigante**, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,
**Rekonante** la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,
**Notante** la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝian partoprenon en tiu agado,
**Konscia** pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. **Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. **Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;

3. **Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;

4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

*Ĝenerala Konferenco de Unesko, Sofio, 1985.*

Parolante pri la kunagado de UEA kaj UNESKO necesas mencii la Centron de Esploro kaj Dokumentado, kiu naskiĝis en la komenco de la kvindekaj jaroj, kiam UEA povis kandidatiĝi por Nobel-Pacpremio. Dum multaj jaroj de sia agado la centro kolektis valoregan materialon, kiu signas ĉiun paŝon de la E-movado. Inter la 25-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto 1987 en Varsovio, okazis la jubilea universala kongreso. Ĝi amasigis ĉirkaŭ sep mil esperantistojn.

La nuntempa E-movado evoluas sur multaj kampoj de kulturo, arto kaj scienco. En la Interancia Esperanto-Muzeo kaj foje sur la fotoj publikigitaj en la revuo Monato (unika, sendependa revuo en la E-movado), oni povas rimarki diversajn familiarajn objektojn, kiujn oni uzas en ĉiutaga vivo, kaj iliaj nomoj estas ĉerpitaj ĝuste el esperantista vortaro. Tiuj estas ekzemple oftaj markoj „Esperanto" de sapo, alumetoj kaj ankaŭ la mondfama trinkaĵo „Mirinda".

En la tuta mondo oni povas renkonti stratpanelojn, memoraĵojn kaj monumentojn ligitajn kun Esperanto kaj L.L.Zamenhof. Paradokse, ekzemple en Brazilo la homo, al kiu oni dediĉis la plej gradan nombron da monumentoj estas ĝuste la kreinto de la internacia lingvo. Kun lia portreto kaj diversaj simboloj ligitaj kun Esperanto, daŭre aperas filatelaĵoj kaj numismatoj. Tekstoj en Esperanto flugas eĉ le en spaco danke al kosmoŝipoj de NASA. Pri registrado de la tiel nomataj ZEO-j (Zamenhof/Esperanto-Objektoj - stratoj, placoj, monumentoj k.a.) respondecas la komisiito de UEA - H.Röllinger, kompilanta la katalogon, kiu priskribas pli ol 1000 tiuspecajn objektojn.


Dekkelkaj radio-stacioj en la mondo disaŭdigas ĉiutage diversajn elsendojn en Esperanto, pruvante, ke ĝi estas lingvo moderna kaj vere utila en la „tutmonda vilaĝo". La plej gravaj kaj popularaj estas la elsendoj de Esperanto-redakcio de Pola Radio el Varsovio (gvidataj de multaj jaroj de geredaktoroj A. Pettyn kaj B. Pietrzak) kaj de Ĉina Radio Internacia. Krome, la elsendojn en Esperanto disaŭdigas: Radio Aŭstria Internacia, Estona Radio, Radia Havano Kubo, RAI Internacia (Italio), Radio Vaticana, Radio Clube de Sorocaba (Brazilo), Radio Kanalsud (Francio), Radio Libertaire (Francio), Radio Radicale 1 (Italio), Radio Rio de Janeiro (Brazilo), Radio 3.ZZZ (Aŭstralio), Radio Västerås (Svedio). Frekfencoj kaj ŝanĝiĝantaj informoj pri la radio-stacioj aperas regule en E-revuoj.

Pli kaj pli populara iĝas la uzado de Esperanto en komputilaj retoj, el kiuj la plej vasta estas „Internet". Krom centoj da personoj kontaktiĝantaj danke al elektronika poŝto, ekzistas jam bone organizitaj komputilaj diskut- kaj babilforumoj, koresponda

servo, lingvaj kursoj, adresaroj kaj arkivoj. Ĉiutage kreskas nombro da eblecoj kaj danke al tio en 1996 UEA starigis specialan Komisionon pri Interreto. La plej utilaj informoj pri E-novaĵoj en la komputilaj retoj haveblas ĉe la fakdelegitoj de UEA.

Antaŭ kelkaj jaroj, post multaj streboj de reprezentantoj de la E-movado, por la unua fojo Esperanto estis uzata de la papo Johano Paŭlo la II-a dum elparolo de la fama beno „Urbi et orbi" kaj estas uzata nun.

Moderna Esperanto estas la lingvo simpla por lerni ĝin kaj uzi praktike skribe kaj parole. Ĝi estas tia danke al la universala vortaro kaj simplaj, logikaj reguloj de gramatiko kaj vortfarado. Siasence ĝi estas lingvo natura (viva, disvolviĝanta), aŭtonomia kaj aposteriora (kreita surbaze de aliaj lingvoj). Por lingvistoj Esperanto estas lingvo analitika (preskaŭ nula fleksio, gramatikaj formoj kreataj danke al aldonado de novaj elementoj, ĉefe prepozicioj) kaj aglutina (kun radiko oni kunmetas afiksojn, prefiksojn kaj fleksiajn formojn). Forgesinte ĝian originon, oni povus diri, ke Esperanto apartenas al la familio de latinidaj lingvoj (tipo franca aŭ itala, venanta de popola latina lingvo), kvankam enhavas prunteprenitajn formojn ĝermanajn (germanajn kaj anglajn) kaj slavajn (ĉefe rusajn kaj polajn). Tamen la plej grava konkludo pri ĝia karaktero estas la devizo: Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo!



## LA ESPERANTA FLAGO

Laŭ siatempa rekomendo de la Estraro de UEA, ĉiuj Esperanto - flagoj konformu al jenaj proporcioj:

Longo: larĝo: latero de la blanka kvadrato = 3:2:1

Latero de la blanka kvadrato:radiuso de la cirklo ĉirkaŭskribebla ĉirkaŭ stelo = 10:3,5

## Kelkaj organizaĵoj kaj institucioj de la Esperanto-movado

**Akademio de Esperanto** - Sendependa lingva institucio daŭriganta laboron de la kreita dum la unua Universala Kongreso Lingva Komitato kaj ĝia Akademio. Ĝiaj celoj kaj taskoj estas: konservi kaj protekti Esperanton laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon; esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton; kritiki kaj revizii verkojn el lingva vidpunkto; defendi Esperanton kontraŭ ĉiuj konkurencoj. La membroj de la Akademio (nun ĉirkaŭ 45) verkas vortarojn, teknikajn terminarojn kaj diskonigas siajn laborojn en formo de specialaj cirkuleroj. Ili renkontiĝas kaj interŝanĝas ideojn inter alie dum universalaj kongresoj.

**Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS)** - Ĝia celo estas strebi al realigo de organiza strukturaro por internacia kaj interfaka scienca kunlaboro, kio ebligos la akiron de akademiaj titoloj kaj gradoj. AIS fukcias en tipe esplora kaj akademia agado, prizogrante kaj subtenante eldonadon de sciencaj verkoj. Ĝi aranĝas kursojn kaj popularigajn aŭ universitatnivelajn prelegsesiojn uzante ne nur Esperanton, sed ankaŭ la italan, anglan, francan kaj germanan lingvojn. La agado okazas en du Sektoroj: La Scienca - kiu konsistas el membroj-scienculoj, kaj La Subtena - al kiu apartenas ne-sciencistaj apogantoj de AIS. Portantoj de akademiaj gradoj aŭ titoloj, akiritaj en ajna lando, povas akiri similan gradon ĉe AIS. La senato de AIS aljuĝas ĉiujare Premion Germain Pirlot al la verko, kies enhavo estas almenaŭ duone en Esperanto. Informoj ĉe: *Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, Kleinenberger Weg 16b, DE-33100 Paderborn, Germanio.*

**Esperanto-Rok-Asocio (EUROKKA)** - Unu el dekkelkaj internaciaj fakaj asocioj ligitaj kun TEJO, fondita en 1988. Celas peri kontaktojn inter Esperantaj rok/pop/ folk-bandoj kaj organizantoj de kulturaj E-aranĝoj; informi esperantistojn pri vivo kaj evoluo de tia muziko kaj distribui ties registraĵojn. Oficiala organo de EUROKKA estas „Rok-Gazet'". *Informoj ĉe: EUROKKA, Floreal Martorell, Vinilkosmo, 31450 Donneville, Francio.*

**Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo** - Fondita en 1987 internacia asocio, kiu celas helpi la eniron de infanoj en la E-mondon kaj lingvon. Gvidata de pedagogoj, helpas al kursgvidantoj kaj instruistoj laborantaj kun infanoj rilate al materialo, problemoj de kulturo kaj interkompreniĝo. Helpas akiri interŝanĝe ludojn, kantojn kaj alian pedagogian materialon por instruado de Esperanto al infanoj. Ĝia organo estas „La Revuo de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo". Informoj ĉe: *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 3876 Belmont Avenue, San Diego CA 92116, Usono.*

**Internacia Esperanto-Instituto (IEI)** - Fondita en 1930 de A.Cseh kaj geedzoj Isbrücker kiel centro por instruado de Esperanto kaj edukado de Cseh-metodaj instruantoj. Aranĝas pedagogiajn kursojn, eldonas kaj vendas kurslibrojn kaj help-materialojn, donacas brokantaĵojn kaj malnovajn E-revuojn. Informoj ĉe: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*

**Internacia Scienca Akademio Comenius** - Fondita en 1986 laŭ severaj elektoprincipoj, similaj al tiuj en naciaj sciencakademioj. Celas prosperigi Esperanton per ties praktika uzado en la sciencoj. Informoj ĉe: *Internacia Scienca Akademio Comenius, p/a Prof. C.Kiselman, Poŝtkesto 480, 751 06 Uppsala, Svedio.*

**Kastora Klubo** - Internacia E-klubo por infanoj kaj gejunuloj ĝis 18-jaraj. Ĝi celas enkonduki siajn membrojn en la E-movadon, instigi ilin al laboro por ĝiaj idealoj kaj pliprofundigo de ilia lingvoscio. La membroj de la Kastora Klubo plenuminte specialajn kondiĉojn ricevas la gradojn-titolojn de Kastoreto, Bruna, Arĝenta kaj Ora Kastoro. Instruistoj kaj kursgvidantoj kunlaborantaj kun la Klubo apartenas al ĝi kiel „Amikoj de la Klubo". Informoj ĉe: *Kastora Klubo de Esperanto, p/a Barbara Chmielewska, ul.Puławska 3-11, 02-515 Warszawa, Pollando.*

**Monda Turismo (MT)** Unu el dekkelkaj internaciaj fakaj asocioj ligitaj kun UEA, fondita en 1970. Celas faciligi turismon per Esperanto; faciligi al esperantistoj vojaĝi, organizi kaj partopreni amasturismon por pruvi la valoron de la internacia lingvo. MT estas aranĝanto de ĉiujaraj Internacia Forumo pri Edukado, Kulturo kaj Turismo, Eŭropa Esperanto Forumo kaj Internacia Esperanto - Kongreso, de diversaj kursoj (i.a. por E-instruantoj), de aranĝoj por turismaj organizantoj kaj vojaĝgvidantoj. Ĝia Turisma Servo -„Esperantotur", konstante organizas internaciajn turismajn aranĝojn. Sub aŭspicioj de MT funkcias la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo. Informoj ĉe: *Monda Turismo, ul.M.Skłodowskiej-Curie 10, 85-094 Bydgoszcz, Pollando.*

**Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)** - Fondita de E.Lanti en 1921, estas la ĉefa laborista organizo utiliganta Esperanton - ĝenerale la dua organizaĵo en E-movado laŭ grandeco kaj graveco. SAT la statute celas inter alie utiligi praktike Esperanton por la klasaj celoj de tutmonda laboristaro; kreskigi en sia membraro la senton de homa solidareco danke al plifaciligo de rilatoj; instruadi kaj klerigadi siajn membrojn en spirito de internaciismo; servi kiel peranto de nesamlingvaj asocioj kun analoga celo. SAT eldonas gravegajn en la E-movado „Plenan Ilustritan Vortaron", „Plenan Vortaron" kaj plurajn socipolitikajn, filozofiajn kaj literaturajn verkojn. Ĝiaj organoj estas: monata „Sennaciulo" kaj socipolitika-literatura jarkajero „Sennacieca Revuo". SAT ĉiujare aranĝas siajn E-kongresojn. Informoj ĉe: *Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, 75020 Paris, Francio.*

**Terminologia Esperanto-Centro** - Fako de UEA zorganta pri lingvaj problemoj. Ĝiaj celoj estas: plibonigo kaj unuecigo de terminologia laboro en Esperanto; reprezentado de Esperanto en naciaj kaj internaciaj terminologiaj kaj normigaj institucioj. La Centro organizas diversajn diskutojn pri terminar-proponoj, kunlabore kun la Akademio de Esperanto iniciatas ilian aproban procedon. Ĝi eldonas kaj revizias normajn dokumentojn, precipe terminarajn. Informoj ĉe: *Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

**Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)** - Fondita en 1938 de E. van Veenendaal-Bouwes en Nederlando, kun la nomo Tutmonda Junular-Organizo. Celas krei solidarecon kaj amikecon inter diverslandaj gejunuloj en konscio pri tutmonda frateco. En 1986 iĝis integra parto de UEA kaj ĉesis havi apartan juran personecon. Konsistas el la individuaj membroj de UEA malpli ol 30-jaraj. La supera organo de TEJO estas ĝia Komitato, ordinare kunvenanta ĉiujare okaze de la Internacia Junulara Kongreso. Ĝia oficiala gazeto estas „TEJO-Tutmonde", kvankam multe pli konata estas eldonata kunlabore kun UEA „Kontakto" - ilustrita gazeto por junaj kaj komencantaj esperantistoj. Informoj ĉe: *TEJO - Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

**Universala Esperanto-Asocio (UEA)** - Fondita en 1908 de H.Hodler, estas la politike neŭtrala, ĉefa organizo prizorganta la esperantistan movadon. Laŭ sia statuto ĝi celas inter alie disvastigon de la uzado de Esperanto kadre de la agado por faciligo de internacia komunikado; plifaciligon de spiritaj kaj materiaj rilatoj inter homoj; kreskigon de sentoj de solidaro, kompreno kaj estimo por aliaj popoloj. Krom individuaj membroj, la strukturo de UEA entenas ankaŭ landajn E-asociojn kaj fakajn asociojn. Ĉiujare UEA organizas Universalan Kongreson, kiu estas la plej prestiĝa kaj samtempe la plej populara aranĝo de E-movado. UEA tenas rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj ties instancoj, funkciigas diversajn agadojn ligitajn kun kulturo kaj edukado, prizorgas unikajn en la mondo delegitan reton kaj libroservon. Ĝia oficiala organo estas la monata revuo „Esperanto". Ĉiujare UEA eldonas ankaŭ la „Jarlibron", kiu estas taŭga gvidlibreto pri la organizaĵo kaj la E-movado. Informoj ĉe: *Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

**Universitato de Tria Aĝo** - Movado por organizi prelegojn kaj kursojn pri plej variaj temoj por homoj de la tria aĝo, t.e. tiuj, kiuj ne plu aktivas profesie. Kadre de la movado funkcias ankaŭ E-grupoj. Informoj ĉe: *Universitato de Tria Aĝo, p/a J.Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent, Britio CT 15 7QB.*

## La servoj unikaj en la Esperanto-movado

**Amikeca Reto** - Listigitaj gastigantoj ofertas al vojaĝantaj esperantistoj senpagan vizitadon de siaj laborejoj kaj diversan aktivadon (foje ankaŭ tranoktadon - sed ne ofte), laŭ la kondiĉoj difinitaj en speciala broŝuro. Funkcias sub aŭspicio de SAT. Informoj ĉe: *Amikeca Reto, Gerard Rollin, 63 rue de la Republique, Charge - 37530 - Amboise, Francio.*

**Delegita Reto de UEA** - Unika en la mondo vasta servo de volontuloj (pli ol 1800!), kiuj senpage pretas respondi al demandoj pri diversaj temoj kaj plurmaniere helpi al petantoj laŭ difinitaj reguloj. La peto pri helpo devas kunhavi la validan membromarkon de UEA kaj internacian respondkuponon. Kompletan kaj aktualan liston de la delegitoj kun detala priskribo de la servo enhavas la „Jarlibro" de UEA, aperanta ĉiujare. La liston de delegitoj oni rajtas provizi nek al komercaj firmaoj nek al ia ajn ekstera entrepreno - la servon rajtas uzi nur la membroj de UEA. Estas strikte malpermesite uzi la servon por almozpetoj kaj komercproponoj. Informoj ĉe: *Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

**Geonkloj Esperantistaj** - Fondita en 1958 internacia organizo, kiu helpas ĝis 16-jarajn esperantistojn komenci E-korespondadon kun plenkreskuloj. Bonega helpo al la gepatroj kaj instruistoj, kiuj volas instigi siajn zorgatojn al la korespondado, kiu ne ĉiam bone funkcias, kiam komencata de nespertaj infanoj. Laŭ peto la organizo „donacas" al la infano „onklon" aŭ „onklinon", kiu volontule koresponde zorgas pri sia nova „familiano". Informoj ĉe: *Geonkloj Esperantistaj, p/a Pearl Bellis, 18 Jervis Street, Hanley, Stoke-on-Trent, Britio ST1 2DX.*

**Internacia Kultura Servo (IKS)** - Celas peri kulturajn rilatojn per Esperanto, popularigi E-kulturon kaj kroatan kulturon, disvastigi la Zagreban Metodon (instrumetodo). Ĝi estas la organizanto de la Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). La organo de IKS estas „Leteroj el Zagrebo". Informoj ĉe: *Internacia Kultura Servo, pp/pk 499, Božidara Magovca bb, Travno, 10010 Zagreb, Kroatio.*

**Koresponda Servo Mondskala** - Servo de UEA celanta havigi al petantoj korespondantojn laŭeble konformajn al iliaj deziroj. Ĝi helpas ne nur individuajn interesatojn, sed ankaŭ grupojn de lernantoj kaj kursanoj. La servo estas senpaga, ĝia uzo postulas tamen la rekompencon de sendokostoj per respondkupono aŭ egalvaloro. Informoj ĉe: *Koresponda Servo Mondskala, François Xavier Gilbert, B.P.6, 55000 Longeville-en-Barrois, Francio.*

**Libroservo de UEA** - La plej granda libroservo ofertanta ne nur akireblajn literaturaĵojn, sed ankaŭ kasedojn, diskojn, vidbendojn, insignojn kaj diversajn esperantaĵojn. Informoj ĉe: *Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

**Pasporta Servo** - Listigitaj gastigantoj ofertas senpagan tranoktadon al la vojaĝantaj esperantistoj laŭ la kondiĉoj difinitaj en speciala broŝuro. Ĝi funkcias sub aŭspicio de TEJO. Informoj ĉe: *Pasporta Servo de TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

## Kelkaj kursejoj kaj kulturaj centroj de la Esperanto-movado

**Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo** - Fondita en 1991 ĉe Monda Turismo kolegio por personoj kun minimume meznivela edukiteco, kun internacia instruistaro kaj studentaro. Dum unu jaro ebligas akiri i.a. la kvalifikojn de E-kursgvidanto, gvidanto de porinfanaj aranĝoj, internacia vojaĝgvidanto kaj organizanto de turismo. Eblas daŭrigi la studadon, akiri diplomojn de turisma ĉiĉerono, organizanto de kultura agado kaj - fine - de profesia instruisto de Esperanto kaj specialisto pri internacia turismo aŭ kulturo. Post trijara studado realigata kunlabore kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, eblas akiri la titolon de bakalaŭro, kaj post pliaj du jaroj - magistro pri humanistiko aŭ morfosciencoj. La studoj okazas de septembro ĝis majo po ĉirkaŭ 30 horoj ĉiusemajne, aŭ laŭ la tiel nomata „eksterĉeesta sistemo" - tio estas kun tri unu- aŭ dusemajnaj studsesioj. Informoj ĉe: *Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, ul.M.Skłodowskiej-Curie 10, 85-094 Bydgoszcz, Pollando.*

**Karlskoga** - La Esperanto Fako de la Karlskoga Popola Altlernejo okazigas kelkajn fojojn jare studsesiojn po 25 lecionoj semajne. La studado okazas tute en Esperanto, partoprenas en ĝi internacia studantaro. Eblas ekzamenoj kaj atestiloj. Informoj ĉe: *Karlskoga Popola Altlernejo, 691 24 Karlskoga, Svedio.*

**Kastelo Grésillon** - Kultura Esperanto-Domo de Franclandaj Esperantistoj. Kultura institucio lokita en pitoreska, ripoziga bieno kun kastelo, lago, insulo, rivereto kaj

arbaro. La asocio celas plialtigon de lingva kaj kultura nivelo, pere de kursoj, prelegoj kaj diversaj aranĝoj por internacia vizitantaro. Posedas bibliotekon kaj libroservon. Ĝia organo estas la monata revuo „Kulturaj Kajeroj". En 1997 Grésillon pro sia agado ricevis la prestiĝan premion Deguĉi. Informoj ĉe: *Kastelo Grésillon, 49159 Baugé, Francio.*

**Kultura Centro Esperantista (KCE)** - Kursejo fama pro la Gastejo kaj Internacia Instituto Edmond Privat. Okazigas diversnivelajn kursojn kaj seminariojn, prizorgas libroservon kaj korespondan kurson. Lokita en pitoreska, turisma regiono. Informoj ĉe: *Kultura Centro Esperantista, CP 311, 2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.*

**La Kvinpetalo** - Plena de familia etoso kursejo, en kiu oni povas partopreni diversspecajn aranĝojn por perfektiĝi pri la lingvo kaj kleriĝi pri E-kulturo. Fama pro siaj vaflaj vesperoj. Informoj ĉe: *La Kvinpetalo, rue de Lavoir, 86410 Bouresse, Francio.*

**San Francisco Ŝtat - Universitato** - Ĉiusomere okazigas oficialajn, kvarnivelajn E-kursojn. Kadre de ili, dum tri semajnoj la gelernantoj loĝas kun tri el la plej elstaraj E-profesoroj. Informoj ĉe: *Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Road SW, Olympia, WA 98512, Usono*

## La plej konataj Esperanto-bibliotekoj kaj muzeoj

**Biblioteko Montagu C.Butler** - Kolekto de libroj, revuoj, kasedoj, filmoj, diversaj esperantaĵoj (pluraj prunteblaj), dokumenta kaj fota arkivoj. Informoj ĉe: *Biblioteko Montagu C.Butler, 140 Holland Park Avenue, London, Britio W11 4 UF.*

**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia** - interlingvistika dokumentejo fondita en 1967 de C. Gacond. Ĝia kolekto enhavas ĉirkaŭ 30000 bibliografiajn unuojn, kiuj servas interalie por la prilaborado de „Bibliografiode Esperanto kaj Interlingvistiko". Informoj ĉe: *CDELI, Biblioteko de la Urbo, Proges 33, 2305 La Chaux-de Fonds, Svislando.*

**Esperanto-Kolektaĵo Fajszi** - Kreita danke al la kolekto komencita de K.Fajszi en 1970. Nun ŝtate aŭspiciata de la Nacia Szechenyi-Biblioteko. Enhavas librojn, periodaĵojn kaj esperantaĵojn. Informoj ĉe: *Esperanto-Kolektaĵo Fajszi, Andrassy ut.27, 1061 Budapest VI, Hungario.*

**Hispana Esperanto-Muzeo** - Fondita en 1968 danke al la kolekto komencita de L.M.Hernandez Yzal en 1963. Enhavas pli ol 8500 librojn kaj pli ol 12300 jarkolektojn de ĉirkaŭ 2480 periodaĵoj. Informoj ĉe: *Hispana Esperanto-Muzeo, Doctor Zamenhof 12, 08739 San Pablo de Ordal, Hispanio.*

**Internacia Esperanto-Muzeo** - Ligita kun la Nacia Biblioteko de Aŭstrio, kiel ĝia aparta kolekto. Krom ĉirkaŭ 20000 libroj, posedas kolekton de valoraj dokumentoj kaj esperantaĵoj. Unika en la mondo institucio respondanta al ĉiuj bezonoj de sciencemuloj esplorantaj E-kulturon. Informoj ĉe: *Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Batthyanystiege, 1010 Wien, Aŭstrio.*

**Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Esperanto-Arkivo** - Biblioteko de Itala Esperanto-Federacio, fondita en 1972 de M.Dazzini. Ekde 1994 la kolekto (pli ol 7000 volumoj) apartenas al la ŝtata Arkivo de Massa kaj estas malfermita por la publiko. Informoj ĉe: *Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Esperanto-Arkivo, Via Svorza 3, 54100 Massa, Italio.*

**Nacia Esperanto Muzeo** - Ununura tiuspeca institucio en Francio, laŭdire la plej eklektika kaj alloga en la mondo. Ĝi estas samtempe arkivejo, dokumentejo kaj biblioteko kun pli ol 6000 titoloj de libroj kaj broŝuroj. Konstante disponigas ekspozicion de revuoj kaj diversaj esperantaĵoj. Informoj ĉe: *Nacia Esperanto Muzeo, S-ro Geo.Junier, 19 rue Victor Hugo, 70100 Gray, Francio.*

## Konsilata baza literaturo


Boulton M.: Zamenhof, aŭtoro de Esperanto.

Cherpillod A.: L.L.Zamenhof: Datoj Faktoj Lokoj.

Enciklopedio de Esperanto.

Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio (aperas ĉiujare).

Jurkowski M.: Od wieży Babel do języka kosmitów.

Lapenna I.: Esperanto en perspektivo.

Lins U.: La danĝera lingvo.

Pechan A.: Gvidlibro por supera ekzameno.

Privat E.: Historio de la lingvo Esperanto.

Privat E.: Vivo de Zamenhof.


Varankin V.: Teorio de Esperanto.

Zamenhof L.: Fundamento de Esperanto.

Ziółkowska M.: Doktor Esperanto.

Żytyński E.: Esperanto i esperantyści.

L. L.Zamenhof




## La Espero

*En la mondon venis nova sento,*
*Tra la mondo iras forta voko;*
*Per flugiloj de facila vento*
*Nun de loko flugu ĝi al loko.*
*Ne al glavo sangon soifanta*
*Ĝi la homan tiras familion:*
*Al la mond' eterne militanta*
*Ĝi promesas sanktan harmonion.*

*Sub la sankta signo de l'espero*
*Kolektiĝas pacaj batalantoj,*
*Kaj rapide kreskas la afero*
*Per laboro de la esperantoj.*
*Forte staras muroj de miljaroj*
*Inter la popoloj dividitaj;*
*Sed dissaltos la obstinaj baroj,*
*Per la sankta amo disbatitaj.*
*Sur neŭtrala lingva fundamento,*

*Komprenante unu la alian,*
*La popoloj faros en konsento*
*Unu grandan rondon familian.*
*Nia diligenta kolegaro*
*En laboro paca ne laciĝos,*
*Ĝis la bela sonĝo de l'homaro*
*Por eterna ben' efektiviĝos.*

# INTERNACIA AKADEMIO DE LA SCIENCOJ SAN MARINO



**MIĘDZYNARODOWE STUDIUM TURYSTYKI I KULTURY**
**INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO**

ul. M. SKŁODOWSKIEJ-CURIE 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ, POLLANDO, TEL./FAX (48-52) 3415-744, 3460-082

**UCZELNIA MIĘDZYNARODOWEJ AKADEMII NAUK**

**KLERIGEJO DE AIS**

ISBN 83-87145-06-8